

INFORMOJ DE LA REDAKCIO

Pro gravaj malsanoj S-ro Makkink dum kelkaj semajnoj ne povis labori; feliĉe li nun rehas bonan sanon. Tamen pro la malsanoj kaj pro urĝa profesia laboro li provizore ne povas esti sekretario de la redakcio; tion ni bedaŭras, ĉar S-ro Makkink sukcesis reguligi la aperdatojn de Sc. Revuo. Lian taskon transprenis G. Hamming, kiu klopodas evoluigi kelkajn organizajn talentojn. D-ro Roelofs ne havas multan tempon, li ĵus ŝanĝis sian profesion. Ni esperas ke baldaŭ la aferoj ree iros bone.

Ĉi tiu kajero grave malfruas. Tion kaŭzis nia volo, doni al ĝi tian karakteron, ke ĝi taŭgu por varbi novajn abonantojn. Por tiu celo necesas, klare indiki la celojn de nia revuo, kaj vidigi kian enhavon ĝi prefere havu. La nuna sekretario perdis multan tempon pensante pri la problemoj.

Verŝajne ni ne jam precize trovis la ĝustan vojon; pri la temo diskutu ankaŭ la estraro de ISAE kaj ĝiaj anoj; kompreneble ankaŭ aliuloj povas esprimi siajn opiniojn.

Ĉi tiu kajero ne estas tute konforma al la idealoj, kiujn ni havas. Speciale mankas artikoloj pri natursciencaj temoj. Ĝis nun mankis la animsciencaj temoj.

La adreso de la redakcio provizore estas:

D-ro Ing. G. Hamming, Boomkruiperlaan 1,
Den Haag, Nederlando.

ENHAVO:

	paĝo
Nia vojo — <i>G. H.</i>	1
La „serumo” de vereco — <i>Prof. D-ro Giorgio Canuto</i>	9
August Strindberg — sveda verkisto kun internacia famo — <i>Rektoro Karl Söderberg</i>	20
Kelkaj tezoj de la <i>Aŭstria Esperanto-Instituto</i>	30
La inter-similigo de naciaj fakterminoj k.t.p. — <i>R. Haferkorn</i> <i>(E. Wüster)</i>	31
Recenzoj	
Technische Sprachnormung (<i>E. Wüster</i>) — <i>W. P. R.</i>	34
Koko krias jam (<i>F. Szilágyi</i>) — <i>G. F. M.</i>	36
Kontralte (<i>M. Boulton</i>) — <i>G. F. M.</i>	36
La kapao kaj aliaj rakontoj (<i>Akutagawa-Ryunosuke</i>) — <i>G. F. M.</i>	36
Al ĉiuj egale (<i>Šalom Alejhem</i>) — <i>G. H.</i>	37
I.S.A.E.-informoj	
Diversaj informoj — <i>S. Alexandersson</i>	37
Kotizoj de I.S.A.E. — <i>S. Alexandersson</i>	38
Ekonomia raporto pri 1955 — <i>S. Alexandersson</i>	39
Informoj de la redakcio — <i>G. H.</i>	40

ATAKOJ KONTRAŬ ĜARDENPLANTOJ de D-ro Paul NEERGAARD

licenciato de hortikulturo, magistro kaj doktoro
de agronomio kaj sekciestro ĉe Ŝtata Plant-
patologia Servo, Kopenhago, krome membro de
la Akademio de Esperanto

La unua libro aperinta en Esperanto:

pri ĜARDENKULTURO, *pri PLANTMALSANOJ,*
pri INSEKTOJ, *pri DAMAĜAJ FUNGOJ.*

La libro enhavas 234 paĝojn artpaperajn, kiuj enhavas 75 tekstfigurojn. Krome, la libro enhavas 9 kolortabulojn, kiuj sume enhavas 85 figurojn, do la libro

entute enhavas 160 bildojn!

Belege tuttole bindita, kun ora stampo kaj kolorpresita kovrilo, desegnitaj de la dana pentristo Mogens Zieler.

Prezo £ 1, afranko 9p.

Eldonita de
THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD, ANGLUJO

Mendebla ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo,
aŭ ĉe landaj kaj lokaj Libro-Servoj,

Profesoro ĉe la Agrikultura Kolegio de Okcident-Skotlando, D-ro
HUGH NICOL, Ph.D., F.R.I.C., F.R.S.E., en *Esperanto*:

Mi ne konas libron verkitan anglalingve kiu valoras siaspece la duonon de
“Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj” La libro estas perfekta kiel presajo, ĝia
lingvo estas senerara. Ĝuebla de ĉiu — fakisto aŭ ne.

Ĉefĝardenisto ĉe la Ŝtata Ĝardeneksperimentejo en Alnarp, Sve-
dujo, S-ro CARL A. KLANG en *Svenska Esperanto-Tidningen*:

Tre malofte oni vidas tiel modernan, aktualan, belpresitan kaj seneraran fak-
libron Pri la enhavo mi konstatis, ke ĝi estas pli moderna kaj aktuala ol
svedaj ĝardenlibroj, kiuj ĝis nun aperis.